


RENKONTE AL LA ILEI-KONFERENCO

Ne ekzistas pli oportuna momento por viziti Pollandon ol estas la jaro 2009. Vi ja scias: ĝi estas la lando kiu gastigos la UK-on, sed ankaŭ malpli grandajn aranĝojn, certe vizitindajn. Unu el tiaj sendiskute estas la 42-a ILEI-konferenco, kiu okazos julie (inter la 17-a kaj 25-a) en la perlo inter polaj urboj — en Krakovo.



La kapelo de Sankta Kinga en la salminejo en Wieliczka.jpg

Invitita de la instruista sekcio ILEI-Pollando, mi decidis viziti la landon anticipe, pro pluraj kialoj. Mi deziras redakti numeron de “Zagreba Esperantisto” kiu estos grandparte dediĉita al la ĉi-jaraj polaj eventoj. Certe mi volis renkonti ankaŭ multajn polajn esperantistojn kaj studentojn en la interlingvistikaj studoj de la Poznana universitato, kaj transpreni la Premion “Spegulo” kiun al mi atribuis la revuo “Spegulo” pasintaŭtune dum Arkones. Tamen, la graveco de mia vizito ligiĝas ĉefe al la ILEI-konferenco, ĉar la LKK invitis min fariĝi membro de la organiza teamo, kaj esplori la surlokan situacion.

Mia unua celo estis la urbo Krakovo, kiun mi atingis frumatene la 31-an de januaro. En la fervoja stacidomo atendis min mia gastiganto Piotr Nosek, la prezidanto, al kiu dum la posttagmezo aliĝis ankaŭ Małgosia Komarnicka, sekretario de ILEI-Pollando. Kun ilia helpo, en la domo de konata pola poetino esperantistino Lidia Ligeża mi preparis la interkonan “kroatan vespermanĝon” vizititan de pluraj esperantistoj: Andrzej Kołpanowicz, Włodzimierz Opoka, Grażyna Porada, Piotr Nosek, Lidia Ligeża, Edward Malewicz kaj Małgosia Komarnicka.

La sekvontan tagon, la 1-an de februaro (dimanĉo), tra la mondfama salminejo Wieliczka gvidis min la oficialaj turismaj gvidistoj Magdalena Tatara kaj Pieter Nosek, akompanitaj de Małgosia Komarnicka kaj Andreo Sochacki. Tiu famega loko estos unu el la ekskursceloj de la ILEI-konferencanoj, kaj mi kiu unuafoje vizitis kaj admiris la lokon, ne senkaŭze konsilas al ĉi-jaraj

vizitontoj de Pollando nepre veni al la urbeto Wieliczka en senpera proksimeco de Krakovo kaj vidi la monumenton de monda heredaĵo el la listo de UNESCO.

Samtage je la 17h00 okazis amika renkontiĝo kun esperantistoj en la restoracio “U Literatów”, kiu estos la loko de la bankedo dum la ILEI-konferenco. Tie mi havis la eblecon prezenti kelkajn proprajn projektojn, aparte la revuon “Zagreba Esperantisto” kaj la projekton de Dokumenta Esperanto-Centro prezentita unuafoje pasintjare en la Universala Kongreso en Roterdamo. La renkontiĝon partoprenis Ela Hareźlak, Grażyna Porada, Andrzej Kołpanowicz, Joachim Kołpanowicz, Magdalena Tatar (kasisto de ILEI-PL), Andreo Sochacki, Piotr Nosek (prezidanto de ILEI-PL), Małgosia Komarnicka (sekretario de ILEI-PL kaj prezidanto de LKK de la 42a ILEI-konferenco) kaj Henriko Kramarczyk, kiu cetere sponsoris la renkontiĝon [*surfote, de maldekstre: Josip Pleadin kun la direktoro de WSZiB*].



La plej grava tago dum mia restado en Krakovo certe estis lundo (la 2-an de februaro), dum kiu kun la reprezentantoj de ILEI-Pollando (Małgosia Komarnicka kaj Piotr Nosek) mi vizitis la estontan konferencojn, kiu cetere estas WSZiB (Wyższa Szkoła Zarządzania i Bankowości — La Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo). Dum la vizito ni renkontiĝis unue kun la teknika direktoro de WSZiB s-ro Stanisław Kuc kaj poste ankaŭ diskutis pri la konferencaj detaloj kun la rektoro s-ro Włodzimierz Roszczyński.



Collegium Maius en Krakovo

WSZiB estas moderna altlernejo. En la instruado estas utiligataj modernaj metodoj de e-lerno. La lernejo disponas pri modernaj komputilaj ĉambroj, bonega hardvaro (ĉirkaŭ 600 komputilaj laborlokoj kun konstanta retkonekto, sendrata enlerneja Wifi-reto).

En 2005 la lernejo estis distingita per "Premio de la Studenta Medio 2005", kiu estas atribuita de la Studenta Parlamento de Pola Respubliko en la kategorio "Studento-amika lernejo".



Draphalo en Krakovo



„Dorożka”

Resume mi diru, ke la polaj esperantistoj en la jubilea Zamenhofa jaro faras grandajn penojn por gastigi amason da esperantistoj kiuj alvojaĝos al ilia lando. Subtenu iliajn strebojn per via aliĝo.

Mi sincere dankas al ILEI-Pollando kaj ĝia estraro, kiuj estis miaj gastigantoj dum la tuta vojaĝo.

Ĝis revido en la 42-a ILEI-konferenco en Krakovo.

Josip Pleadin